PENSEO

N-ro 209

mar. / 2009

Monata Beletra Revueto en Esperanto

Honorita de Premio Grabowski,1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 20-a jaro http://www.elerno.cn/penseo/penlisto.htm

Guozhu

Okaze de la Virina Tago en la 8-a de marto, mi ofte memoras la vortojn de avino Bingxin (1900-10-05/1999-02-28):

Se en la mondo ne ekzistas virinoj, tiam mankas al nia mondo 5 dekonoj da vero, 6 dekonoj da bono kaj 7 dekonoj da belo.

Mi opinias ke tio estas la plej klasika fama diro pri virinoj en la mondo.

Bingxin



Bingxin — glacie pura koro —
amata avino centjara,
al infan-legantaro kara
ĉiam leteris kun fervoro.

Ŝia homeco kaj laboro
modelas per honesto rara.
Bingxin — glacie pura koro —
amata avino centjara.

Kaj ŝi surskribis je favoro
vorton pri Esperant' deklara.
Varma subteno malavara
vivos en nia karmemoro.

Bingxin — glacie pura koro !

Xu Zhimo (1897—1931)

Ĝojo de Neĝero

se estus mi neĝero
leĝere firtanta en aero
mi devas teni la direkton—
flirte, flirte, flirte
direkte al la tero
mi volas flugi ne al val' soleca
nek al montĉeno trista
nek al dezertaj stratoj por lamenti
flirte en libero
vidu, mi tenas la direkton
mi dancas ĉarme sur ĉielo
jam celas al kvieta la loĝsfero
atendas ŝin alveni por vizito en
ĝardeno
flirte, flirte, flirte
aĥ, ŝi odoras per arom' de cinabra
umeo
mi tiam pere de korpa leĝero
malpeze alkroĉiĝos al vestbrusto ŝia
sin premos al mildonda sino ŝia
fandiĝos, fandiĝos, fandiĝos
en ŝian mildan bruston kun tolero



elĉinigis **Vejdo**

Ĉineske

Lily

Kac-suĉado

—laŭ ĉinesko Shuilongyin*

manfrotad' de l' suĉul'

faras kacon rigida

ŝia lango

ŝmace lekas

per rapida

ronda movad'

de kackapo

piramida

ĝis pufaj ovoj

jam la ilo

fariĝas

humida

ŝia buŝ' incita

mordetas

per avida

amdeziro

ĝin kaj glitas

mov' senbrida

lek' senĉesa

jam lasas ĝin

sku-trepida

jen li nun pretas

eniri ŝin

seks-memfida

**Shuilongyin (Akva Drako): ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 12 versoj de 67,444,444,5433 / 6, 34, 444,444,544 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xxa,xxa,xxxa / a,xa,xxa,xxa,xxa (x= senrima)*

Vejdo

Sendorma Nokto

—laŭ ĉinesko Suzhongqing*

en koro brulas la flam'

sendormas mi jam

turniĝante ade

pro perdita am'

malvera

vort-ornam'

mava dram'

jam foriĝis

oh, vanuis

falsa proklam'

**Suzhongqing (Kora Sento): ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 4 kaj 6 versoj respektive de 7,5,65 / 33,3,444 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa / xa,a,xxa (x=senrima)*

Zigzaga Montvojo

—laŭ ĉinesko Pusaman*

kvazaŭ smeralda ruband'

ĝi spiralas al bluland'

tra densa nebul'

en flosa nublul'

grimpanto vera

kun volo fera

marŝadas pene

ĝis pint' senĝene



Pusaman (Budhista Dancisto): ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 4 versoj de 7,7;5,5; / 5,5;5,5 silaboj kun para rimo


Sero

Falĉi Sovaĝajn Herbojn

—laŭ ĉinesko Xiaochongshan*

sovaĝherboj kun konspir'
volas okupi
pri ramp-ir'
vastan teron sen ajn gir'
gravedaj
jam je fi-aspir'

jen per mana tir'
jen per falĉado
de seg-ŝir'
homoj jen per unu spir'
senigas
ilin laŭ dezir'



**Xiaochongshan (Malgranda Montvico): ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 6 versoj de 7, 53,7,35 /5,53,7,35 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,a,xa (x=senrima)*

Antaŭvespere de Kristnasko 2008

—laŭ ĉinesko Jianzi Mulanhua*

Nun tie ĉi

ĝoj' plenplenas en Ĉini'.

Juna popol'

orgias kun sang' en bol'.

Eĉ fremda fest'

furoras en ĉina vest'.

Ĉu la progres'

homa aŭ vigla eksces'?

**Jianzi Mulanhua (Mallongigita Melodio Magnolia): ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 4 versoj de 4,7; 4,7 silaboj kun para rimo.*


Eto

Vintro en Strateto

—laŭ ĉinesko Jiangnanchun*

malseka
kotplena
vojeto ŝtona
sen bru' promena
sub malforta sunlumo
oblikve lante trena

eksonis
paŝbruo
sole pasanta
fale kun skuo
rapide revenhejma
por varmalita ĝuo



**Jiangnanchun (Printempo Sude de Rivero): ĉina*

fiksforma poemo el 6 versoj de 33,55,77 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xa,xa (x=senrima)

Homara Varmo

—laŭ ĉinesko Busuanzi*

homara varmo
de koro al kor'
penetre injektiĝas
per kompata bor'

homara varmo
senpreza trezor'
profunde gravuriĝas
ĉiam en memor'

**Busuanzi (Aŭguristo): ĉina fiksforma poemo el du strofoj po kvar versoj de 55,75 silaboj kun duona rimo.*

Montoj

—laŭ ĉinesko Dekses-Silabo*

Mont'
sinuas al horizont'
en nebul'
kiel arka pont'

mont'
torentas kiel marond'
disflue
el junverda font'

mont'
elkreskas sur roka fond'
spite al
tempesta renkont'

**Dekses-Silabo: ĉina fiksforma poemo el kvar versoj de 1, 7, 35 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa (x=senrima)*

Zhuang Qixiong

Ebrio

— laŭ ĉinesko Rumengling*

Ĉinesko ebria,
kiel anim' dia.
Ĉiuj amikoj,
kun interes' pia.
Scia,
scia
sprit', ĉiam glacia.

**Rumengling (Kvazaŭsonĝe): ĉina fiksforma poemo el 7 versoj de 6,6,56,2,2,6 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa,a,a,a. La kvina kaj sesa versoj estas samaj.*

Ĉielarko

— laŭ ĉinesko Daolianzi*

En pluvo
de silent',
ĉielark' el orient'
kolorbrilas fiktive
kun viva indiferent'.

**Daolianzi (Kanto de Lavantino): ĉina fiksforma poemo el 5 versoj de 33,7,77 silaboj, laŭ rimaranĝo xa, a, xa (x=senrima)*

◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_

Eldonas Redakcio de ***Penseo***
Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Vejdo)
Adreso: No.-3-2 de la 5-a etaĝdomo
de No. 19, Wujiang St.,
Jiangbei Distrikto,
Chongqing, 400020, Ĉinio
Tel: (023) 67095890 (hejme)
Poŝtadreso: vejdo@163.com
Ĉiujn kontribuaĵojn al la ĉefredaktoro.
Por legi pasintajn numerojn de Penseo, vin turnu al www.elerno.com/penlisto.htm

◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_